



Estrara Komunikado EKO 2015-03 sendita el Budapeŝto la 5an de februaro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

LA 9A SEMINARIO DE AMO

Rio de Ĵaneiro - Brazilo


Verkis: Anna Lobo
kaj Adrián Alejandro



Kadre de la 50-a Brazila


Kongreso de Esperanto (vidu la supran foton), kiu okazis de la 23a ĝis la 27a de januaro en la urbo Rio de Ĵaneiro, ni plezure okazigis la 9-an Seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO). Ĝi okazis dum tri el la tagoj de la kongreso dum 4 horoj ĉiutage. Ĝia temo estis 'Kiel iĝi aktivulo'. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 25 homoj, kaj ni opinias ke ĝia okazigo estis vere grava por la movado, kaj por la partoprenintoj.

La organizantoj de la Kongreso multe apogis ĉi tiun trejnadon, kaj ekde la komenco ĉiu planis konservi sufiĉan spacon por ke ĝi okazu – ĉiuj ege ĝojis kiam la peto ĝin okazigi estis akceptita. La movado en nia lando donas ja grandan valoron al ĉi tiu trejnado, jam tiel, ke en malpli ol unu jaro, estis la dua fojo ke ĝi okazis en Brazilo.



La unua sesio okazis la 24an de januaro, en ĝi estis diskutata la temo 'kiel rilatigi Esperanton al daŭripovaj evoluaj celoj' kun la gvidanto Alvaro Motta (vidu la duan foton). Dum la komenco de la seminario, Alvaro komencis paroli pri la nunaj problemoj, pri kiuj okupiĝas Unuiĝintaj Nacioj (UN). La tasko de la partoprenintoj estis cerbumi pri kiel Esperanto povus helpi solvi tiujn problemojn.

Por la dua tago, la 26an de januaro, la temo estis 'Hom-mastrumado', kaj la gvidanto estis Anna Lobo (sur la tria foto). Ĝi celis kunkonstrui sciaron pri kio estas homo, kiel estas ĝia rilato kun la socio, kial gravas teamoj, kiel mastrumadi teamojn, kiel komunikiĝi, kaj tiel plu. Gravaj iloj



estis skizitaj, utilaj por ke homoj bone laboru kune. En tiu ĉi tago multaj gravaj punktoj estis diskutataj inter la partoprenantoj en tre agrabla etoso.

En la lasta tago de la trejnado, la 27an de januaro, la temo estis pri 'Varbado', kies gvidanto estis Rafael Zerbetto (sur la kvara foto). La celo de tiu ĉi lasta sesio estis konsciigi esperantistojn pri la plej bonaj manieroj por varbi kaj reklami pri la lingvo. Oni diskutis pri malsamaj varbmanieroj, analizante ilin laŭ la kvanto da homoj atingeblaj, laŭ la tempo bezonata por prepari la varb-materialojn kaj laŭ la allogeco de la varbado.



La trejnado estis grava por ĉiu partopreninto. Ĝi donis spacon por ke ni kune pripensu la esperantan movadon. Ĝi donis okazon por ke ni pripensu kiel plej bone aktivigi pro Esperanto. Kiu estas la plej bona maniero montri la lingvon ekster la movado. Kiel plej bone regi movadon kaj sin mem, por atingi la disvastiĝon de esperanto-parolantoj tra la mondo. Laŭ ni, Esperanto jam venkis, sed gravas ke ĝi estu ame subtenata laŭ manieroj, kiujn postulas nia hodiaŭa mondo.

===== Vortoj: 454 supre/ 680 entute =====

Komentoj de Stefan MacGill:

Ni kore gratulas al la brazilaj kunlaborantoj (multaj el ili en BEJO – la landa sekcio de TEJO). Aparte ĝojiga estas la temo de Alvaro Motta, pri la daŭripovaj evoluaj celoj de UN: tio emfazas, ke la temoj de AMO-seminarioj ne devas ĉiam esti internaj. Ni kiel esperantistoj dividus multajn mond-nivelajn celojn, tial ni devas pri ili informiĝi kaj trejni nin ankaŭ pri ili – kiel agadi uzante nian helpilan lingvon kaj komunumon por kontribui al tiuj mondaj streboj.



En la diskutgrupo <uea-membroj> tien-reen saltadis nekonciza debato pri la difino de juneco, reage al la antaŭinformoj pri la brazila seminario, kie atendeblis partopreno de multaj junuloj. Ĉiu klopodo difini persone aŭ teorie la limojn de juneco havas absolute nulan utilon aŭ rilaton al niaj realaj bezonoj. Rigardu nur la aĝdistribuan grafikajon pri la membraro de UEA, kaj vi sendiskute devas preti akcepti por la asocio radikale alian difinon de 'juneco' oni la kutimaj. La problemo brule urĝas, kaj la AMO-programo estas unu el la malmultaj eblaj konkretaj agoj de la nuntempa UEA fronti tiun defion. AMO estas rejunigilo. Nesufiĉa, sed almenaŭ eko.

Aparta komuniko tuj sekvas pri la planoj por AMO tra 2015, pri la kursaro en Poznano, kaj aliaj aktualaj novaĵoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.